

# La Espero

SVENSKA ESPERANTOTIDNINGEN

Nro 7/1988

Rotterdamo:  
La esperan-  
tistoj vizitis  
sian  
"hejmurbon"

*Jubilea festo  
fino de  
centjariĝo*

ĈU LA ĈINOJ  
PLUENPUŜOS  
ESPERANTON  
?

Strategia  
plano por  
la dua jar-  
cento de  
Esperanto

# "Espero 88" Esperanto- lotteriet är igång!

Den 31 oktober börjar försäljningen av Esperantolotteriet. Lotterinämnden har endast beviljat fyra månaders försäljningstid. Sista försäljningsdag är alltså den 28 februari. Lotteriets organisatör är Lennart Svensson i Filipstad.

Esperantoförbundets lotteri är troligen Sveriges vinsttätaste rikslotteri med vinstschema 1:7,8, alltså med vinst på mer än var åttonde sålda lott. Det är också det enda rikslotteri där direktutlämnade priser består av presentkort så att vinnaren själv kan bestämma vad som skall köpas.

## Vinster för 50000 kr

Det totala vinstvärdet är 50000 kr, fördelat på 635 vinster. Högvinsterna är Svenska statens premieobligationer till ett inköpsvärde av totalt 10000 kr, fördelade på 1x5000, 1x2000 och 3x1000. Tio vinster ger presentkort à 500 kr, 20 vinster presentkort à 250 kr, 100 vinster presentkort à 100 kr och 500 vinster presentkort à 40 kr. Presentkortet gäller i alla affärer som tillhör Köpmannaförbundet eller Kooperativa förbundet. I mån av tillgång kan man också byta vinster mot nya lotter.

## Ge lotter i julklapp!

Vi hoppas att många esperantister och klubbar gör en försäljningskampanj under november och december. Nettoinkomsten på lotteriet tillfaller Esperantoförbundet.

Beställda lotter kommer att skickas ut v. 43 och 44. Ändring av beställning kan göras per telefon 0590-30208 (telefonsvarare).

Man kan också beställa per postkort, adress "Espero 88", Box 80, 68200 Filipstad.

# La Espero

## Organ för Svenska Esperantoförbundet

Adress: EsperantoCentro, Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm, tel. 08-11 74 34

Ansvarig utgivare: Bertil Åkerberg

Redaktör: Karin Lindquist, Västermovägen 19, 732 00 Arboga, tel. 0589-155 31

Sättning: Per Aarne Fritzon

Utformning: Franko Luin

Tryck: EsperantoCentro, Stockholm 1988

# Esperantoförbundet

Adress: EsperantoCentro, Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm, tel. 08-11 74 34

Öppettider: måndag - fredag kl. 10.00 - 14.00; vintertid måndag - torsdag även 17.30 - 19; vissa lördagar kl. 10.00 - 12.00.

Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

Medlemsavgift 1988: Direktansluten medlem 100 kr. Familjemedlem (utan tidning) 50 kr. Ungdomsmedlem 50 kr.

Enbart prenumeration: 100 kr. Gåvoprenumeration till utlandet: 50 kr.

Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlemsavgiften.

Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund och får dess tidning *Kvinpinto*. Om du inte får den, meddela ditt födelseår till EsperantoCentro.

# SEFs styrelse

Ordförande: Karin Lindquist, Västermovägen 19, 732 49 Arboga, tel. 0589-155 31 (La Espero, massmedier)

Vice ordförande: Märtha Andréasson, Fl. 2265, 425 00 Hisings Kärra, tel. 031-57 11 33 (Årskongresser, ekonomifrågor)

Sekreterare: Ulla Luin, Myggdalsvägen 123, 135 42 Tyresö, tel. 08-712 82 91 (kansliet)

Kassör: Börje Andersson, Ingegatan 4A, 541 50 Skövde, tel. 0500-12205 (massmedier)

Styrelseledamot: Kerstin Rohdin, Ringvägen 11B, 579 00 Högsby, tel. 0491-20461 (turnéer, bibliotek)

Styrelseledamot: Bertil Andreasson, Södra Rörm, 242 00 Hörby, tel. 0415-501 52 (utbildning, nordiskt samarbete)

Styrelseledamot: Haldor Vedin, Jordbrogatan 57, 603 64 Norrköping, tel. 011-16 26 87 (utveckling, intern.org.)

Suppleant: Ingemar Nordin, Mosebacke torg 8, 116 46 Stockholm, tel. 08 - 41 46 37 (kansliet)

Suppleant: Leif Nordenstorm, Studentvägen 36, L:51, 75234 Uppsala, tel. 018 - 153362

Informationskommittén: Bernt Lindquist, Västermovägen 19, 732 49 Arboga, tel. 0589-155 31.

# Esperantoförlaget

Postadress: Box 7502, 200 42 Malmö

Besöksadress: Möllevångsgatan 20B, Malmö

Telefon: 040-12 20 29

Postgiro: 578-5

Öppettider: 1 september - 15 maj: onsdagar 10 - 11, torsdagar 17 - 18.

Skriftliga beställningar expedieras under hela året.

Expedition: Wivi Nilsson

Styrelsens ordförande: Anita Lindblom.



## Enhavo

- 66 Esperantoloteriet är igång!
- 67 Ek al la dua jarcento!
- 68 2300 partoprenantoj en Roterdamo,
- 69 Altklasa arta programo
- 70 La komitato diskutis strategion por dua jarcento Jubilea festo
- 71 "Scienco kaj tekniko por internacia komprenigo"
- 72 Centro Zamenhof prezentita
- 73 Svedoj sukcesaj en belartaj konkursoj  
Recenzo: Somera tago kaj aŭtuna vespero
- 74 TRA LA LANDO  
Renkontigo de geedzaj esperantistoj  
Somera kurso en Karlskoga Popolalilernejo  
Kio okazos en Malmö inter la 22-a kaj 23-a de oktobro?
- 75 Sukcesa seminario pri tradiciaj japanaj artoj
- 76 Mankegas E-instruistoj en Tanzanio
- 77 Informationsmaterial för skolbruk
- 78 TRA LA MONDO  
Internacia universitato en Cinio uzos Esperanton  
Luksa Esperantobrosuro pri Norvegio  
Invito al Zairio
- 79 Nekrologoj:  
Sven Aleksandersson  
Curt Alf  
Viktor Janheim
- 80 Ragnar kaj Sven

En ĉi-tiu numero fotoj de Bernt Lindquist kaj Ulla Luin

## Prezidanto:

### Ek al la dua jarcento!

La Universala Kongreso en Roterdamo estis malgranda kompare al tiu en Varsovio, kaj pro tio ĝi estis pli facile administrebla! Renkontigoj inter amikoj pli facilis kaj tial la kongreso estis pli "amika".

En la gazeto ni raportas pri kelkaj el la multaj okazintaĵoj. Estis aktiva, laborplena kongreso. En ĉiuj kampoj oni volas prepari sin por la dua jarcento.

Mi partoprenis en grupo, kiu diskutis la estontan kunlaboron inter UEA kaj la landaj asocioj. Sed la rezulto ne estis tiel efika, kiel multaj el ni dezirus. Pro tio reprezentantoj de la nordiaj landoj decidis proponi al siaj landaj asocioj starigi komisionon unu- aŭ duper-sonan, cele al kunordigo de ekstera informado.

La ideo estas, ke ni, kune kun la fakaj organizoj, per sama materialo kaj samaj argumentoj samtempe prilaboru samajn celgrupojn en niaj respektivaj landoj - ekz. internaciajn organizojn, kiuj vere bezonas komunan lingvon en sia laboro, sed ankaŭ parlamentanojn aŭ aliajn celgrupojn laŭ niaj komunaj decidoj.

S-ro Tibor Sekelj havas similan ideon, prezentitan dum la kongreso. Oni starigis komisionon por prilabori tiun ideon, kaj rezultis rezolucio. Sed tiu rezolucio estis malakceptita de la UEA-komitatoj. Ĉar mi estis unu el la komisionanoj kaj tre kredas je lia ideo -



ja konforma al mia - mi estis tre malkontenta.

Oni demandas sin, ĉu la pinto de la Esperantomovado ne volas kunordigi sian informadon por atingi pli efikan rezulton? Nu, tamen ni espereble havos nian nordian kunlaboron. Kaj mi pensas, ke pluraj landoj, kiuj jam montris sian intereson, volos kunlabori kun ni.

La estraro de UEA prezentis Strategian planon de UEA por la venontaj kvin jaroj. La plano aparte emfazas la financojn, kies fortigo estas antaŭkondiĉo de la realigo. Temas pri profunda, honesta analizo de nia movado - niaj disponeblaj rimedoj, niaj bazaj celoj, fortoj kaj malfortoj, prioritatoj... Ĝi instigas diversmaniere al agado, ĝi ankaŭ parolas pri kunlaboro!

La plano ankaŭ analizas la taskojn de la homoj diversnivele: La stabanoj, estraranoj, komitatanoj, landaj kaj fakaj asocioj, delegita reto, la individuaj membroj...

Estas bona, efika plano, ne tute preta, ĉar komitatanoj kaj landaj asocioj nun esprimos sian opinion. Dum la venonta UK en Brajtono ni akceptos (aŭ malakceptos) ĝin.

Poste dependos de ni ĉiuj, ĉu la plano realiĝos aŭ ne!

Karin Lindquist



# 73-a Universala Kongreso 2300 partoprenantoj en Roterdamo

Laboro kaj ĝuo – jen du vortoj ofte aŭditaj dum la duhora kongresa malfermo. Pri la ĝuo jam ne ekzistis dubo: En la minutoj antaŭ la enmarŝo de la podianoj, la dumilvoĉa konversacio elradiis kontenton kaj partoprenemon.

Pri laboro oni je la fino povas konstati, ke estis ankaŭ laborplena kongreso. Multaj fakaj organizoj kunsidis, grupoj ligitaj al UEA, lernejoj, pacaj grupoj laboris, kaj preskaŭ ĉiuj prezentis sian laboron forme de rezolucioj. Estas grave, ke tiuj rezolucioj nun ne restos nuraj vortoj surpaperaj, sed vere efektiviĝos!

## Pilgrimado al la hejmurbo

Laŭ la prezidanto de UEA, Humphrey Tonkin, temis pri pilgrimado ĉi tien – hejmurbo de la esperantistaro. Kaj kompreneble li aludis la fakton, ke la Centra Oficejo de UEA situas en Roterdamo.


D-ro Ottó Haszpra enkondukis la kongresan temon: "Scienco kaj tekniko por internacia kompreniĝo". Ulla Luin detale skribas pri tiu temo aliloke en la gazeto.

Specialan bonvenigon oni direktis al SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda), kiu estis reprezentita en la kongreso. Kaj kompreneble ankaŭ al TEJO, la junulara sekcio de UEA, kiu povis raporti pri la Internacia Junulara Kongreso en Zagrebo kun 729 homoj el 46 landoj.

"Estimata prezidanto, estimataj gekongresanoj:

Vi aŭdis jam multajn salutojn, kaj estas ja konvene en la inaŭguro de Universala Kongreso, ke oni salutu. Tiuj salutoj estis direktitaj al vi, al la kongresanoj. Mi nun volas saluti en kelkaj aliaj direktoj."

Tiavorte komencis prof. John Wells sian festparoladon. Kaj li



Jen Humphrey Tonkin, prezidanto de UEA, (kun salutontoj de landaj asocioj en la fono) adresanta la kongresanojn per plia brila parolado

direktis siajn salutojn al i.a.:

- La urbo Roterdamo – la umbiliko de la Esperantomovado, ĉar tie estas nia Centra Oficejo.

- Erasmo – mondkonata klerulo el Roterdamo.

- Nederlando, kiu havas fortan komprenon pri sia propra nacieco, kiu longe batalis por sia sendependiĝo... Nederlando ankaŭ estas la hejmo de de unu el la plej gravaj evoluoj en la scienco kaj tekniko rilate la lingvoproblemon; ĝi estas la hejmo de BSO, kie oni evoluigas la sistemon DLT por maŝintradukado pere de Esperanto kiel interlingvo.

- La mondo, en kiu "eksplozivas paco", kiel li diris, menciante kelkajn progresojn en la mondo, kiuj ŝajne gvidos al pli paca mondo.

... "Ni eble fine trovis, ke en la moderna mondo la milito estas ne plu gajnebla; kaj kian perspektivon tio donas por Esperanto!

Ĉar restas dume la lingvoproblemo: La homaro estas ankoraŭ dividita per siaj diversaj lingvoj. Ni ne havas eblecon rekte komuniki unu kun la alia, sen ke unu estu

supera kaj alia en suba pozicio, aŭ ke ambaŭ baraktas per fremdaj lingvoj...

## Homa lingvo, ne maŝina lingvo, nek kodo

Fine, do, mi salutas Esperanton. Mi salutas la lingvon, tiun etulon de 1887, bebo kiu kreskis ĝis tio, ke en la pasinta UK en Varsovio ni povis havi 6000 homojn kune, kiuj komunikis facile, glate, unu kun la alia per ĝi. Homa lingvo, ne maŝina lingvo nek kodo: En la epoko de informadiko, de elektronika redaktado ktp, la bezono de komuna lingvo restas. Nia lingvo evoluis, kiel ĉiu normala lingvo. Ni raciigis ĝin kaj precizigis ĝin. Ni vidis, kiel ni povas ekspluati ĝiajn kaŝitajn kapablojn.

La sendependigo de la afiksoj, la kreo de novaj adverboj, kiaj ne ekzistas en etropaj lingvoj, la rektaj verbigoj, la ekspluatado de tiuj eblecoj. Ni evoluigis nian vortprovizon por esti adekvata al la bezono de la moderna mondo. Ni ankoraŭ havas niajn etajn diskutojn pri



multaj el tiuj punktoj, kaj tiu donas al ni bonan amuzon dum niaj kongresoj, foje. Sed la esenco, la kerno estas, ke Esperanto estas lingvo kapabla transpreni la rolon por kiu ni celas, ke ĝi estu uzata.

Esperanto do estas lingvo, kiu havas firman socian bazon. Vi estas ĝi, vi kaj ĉiuj esperantistoj. Se mi at ĉi kiu ajn alia individuo havus la ideon ŝanĝi Esperanton - mi ne scias kiel, enkonduki amase novajn vortojn, ŝanĝi la gramatikon, ŝanĝi la prononcon - mi ne povas. Neniu el ni povas. Ĉar vi, ni, la granda socia portanto de Esperanto estas la bridantoj, la bremsoj, la garantio por vera lingvo, kaj pro tio Esperanto estas lingvo kaj ne projekto. Pro tiu socia bazo.

Tio signifas, ke mi salutas ankaŭ la esperantistojn...

Mi salutas do la veteranojn. Mi salutas la spertajn esperantistojn. Mi salutas ankaŭ la komencantojn. Kaj speciale mi volas saluti tiujn, kiuj nun ĉeestas sian unuan Universalan Kongreson. Vi povos mem sperti tiun miraklon, kiun ĉiu el ni spertis siatempe, ke Esperanto ne estas ia teoriaĵo, kiun ni penis studi hejme el libroj at en malgrandaj kursoj. Ĝi estas realaĵo...

Nia tasko estas konvinki la mondon, ke nur per Esperanto - kiu estas samtempe facila por la lernanto, kaj neŭtrala inter diversaj partioj kaj partianoj - nur Esperanto povos fine solvi la lingvan problemon."



*Trideko da infanoj, patoprenantoj de la ĉijara infana kongreseto, ankaŭ salutis la kongresanojn per kanto kaj mansvingado*

## 73-a Universala Kongreso Altklasa arta programo

La kialo de la Universalaj Kongresoj estas ne nur kunveni, kunsidi, diskuti kaj decidi. Gravaj estas ankaŭ la kulturaj interŝanĝoj, kaj la evoluo de tiu flanko de la kongresoj dum la 40 jaroj, kiujn mi povas prijuĝi, estas vere rimarkinda.

Tiurilate, la roterdama kongreso estis nova perlo en la ĉeno. La distrajn eventojn enkondukis la nacia vespero, kiu prezentis kaj seriozan kaj pli gajan partojn de la programo. Tre ĝuindaj estis la pianosolito kaj la kantistinoj, kiuj prezentis operan muzikon kaj popolkantojn.

Pri la pli gaja parto respondecis grupo el Frislando de tri ĉarmaj junulinoj kaj junulo. Ili kantis lokajn popolkantojn kaj lerte traktis aron da instrumentoj. La fortaj aplaŭdoj montris la estimon de la publiko.

Eble la ĉefa punkto de la kongresa kulturprogramo estis la lasta vespero, kiam la dumila publiko kolektigis por ĝui la internacian vesperon. Kun ĝojo ni povis konstati, kiel multajn altkvalitajn artistojn sukcesis allogi la Esperantomovado.

Ni memoras la belkantantajn bulgarinojn Adamova, Kostova kaj la jam de pluraj jaroj konatan kaj ŝatatan Maria Angelova. Ni ekkonis du ĉeĥajn kantistojn, Smyčka kaj Vich, kiuj prezentis operajn ariojn kaj duetojn kaj ĉeĥajn popolkantojn.

Ĉiuj gekantistoj estis akompanataj de la lerta kaj ĉarma pianistino Elena Puhova el Sovetunio. Gaja kantisto estis Le Puil, kiu mem akompanis sin per gitaro.

Pli unika estis belsona harpo, traktata de Saskia Veen el Nederlando. Post kelkaj solludoj, ŝi akompanis la tenoron Edward Hoebelman. Iliaj programeroj estis vere ĝuindaj partoj dum kaj la nacia kaj la internacia vesperoj. Du monologoj de nia majstro de amuzo kaj antaŭa UEA-direktoro, Stefan MacGill, vere ridegigis la tutan publikon.

Tre ĝuindaj interrompoj en la kongresa laboro estis la individuaj koncertoj de ĉiuj partoprenintaj artistoj. Gravaj kontribuoj al nia Esperantokulturo estis ankaŭ pluraj prezentoj de la pola pup teatra grupo, la pola aktoro Kazimierz Mazur, kiu prezentis verkon de Puŝkin, "La neĝa blovado", kaj fine la granda teatra vespero, kiam la Bulgara Esperanto-Teatro prezentis la teatraĵon "Fabeloj pri kolpakoj".

Krome la granda, internacia Esperantohoro ĝojigis nin plurfoje dum la kongreso. Ĝin ĉiujare fervore kolektas kaj gvidas Dimitr Terziev el Bulgarujo.

Kun speciala ĝojo ni en la granda, dankema publiko povis konstati, ke ĉiuj kantoj estis prezentitaj en Esperanto. Do ankaŭ la distrajn partoj de nia kongreso estis unulingvaj.

Linnea Edsenius



# La komitato diskutis strategion por dua jarcento

Ci-jare la komitatkunsidoj okazis preskaŭ tute ekster la kongresa semajno, kaj antaŭ kaj post la kongreso.

Estis ses diversaj kunsidoj kaj la unua estis jam posttagmeze sabate la 23-an de julio. La dua kunsido okazis dimanĉe la 24-an kaj estis kombinita kun la unua ĝenerala kunsido de UEA, kiam estis publika diskuto pri la estrara raporto. Tuj antaŭ la fermo de la kongreso ni havis la trian, sufiĉe mallongan kunsidon, kie ni diskutis kaj aprobis la kongresajn rezoluciojn kaj elektis novajn honorajn membrojn, por prezenti tion al la kongreso dum la ferma ceremonio.

La ceteraj tri kunsidoj estis multe pli longedaŭraj, ĉar ili okazis sabate posttagmeze kaj dimanĉe post la fino de la kongreso. Estis longa tagordo, entute 42 punktoj, kiun devis trakti la ĉ. 60 komitatanoj.

Dum la unua kunsido ni i.a. studis la varsovian protokolon kaj la proceduran regularon, elektis dumkongresajn komisionojn kaj decidis pri ilia labormaniero. Tiuj komisionoj laboris dum la kongresa semajno, kaj aranĝis publikajn kunsidojn, kie pli aŭ malpli multaj partoprenantoj diskutis la venontan laboron en ĉiuj fakoj.

Dum la lastaj kunsidoj ni aŭdis, diskutis kaj aprobis raportojn pri kulturo, edukado, eksteraj rilatoj, planado, informado, k.a. Kiel kutime, la punkto pri la asociaj financoj kaŭzis grandan debaton kaj longan diskuton pri la buĝeto, la bilanco kaj la diversaj spezoekontoj. Por estonte havi pli facilan superrigardon de la librotenado, oni diskutis ŝanĝi la nunan sistemon. Tamen kaj la estraran kaj la revizoran raportojn oni aprobis.

La punkto, kiu vekis plej longan

kaj plej intensan diskuton estis la "Strategia plano de UEA - En la duan jarcenton", kiun la estraro ellaboris dum jaroj kaj nun prezentis al la komitato.

## Jubilea festo

Jatide dum la kongresa semajno estis aranĝita Jubilea Festo, kiu signifis, ke oni markis la finon de la Jubilea Jaro de Esperanto.

Inĝ. Ludoviko Zaleski-Zamenhof inaŭguris tiun festan tagon kaj prezidanto Humphrey Tonkin festparolis, dirante i.a.:

"La Jubileon faris ne unu homo aŭ kelkaj, sed ni ĉiuj... Nia Esperanto vivas ĉar ĝi ĉie troviĝas - en Ĉinio, en Afriko, en la Amerikoj, en Eŭropo, en Oceanio. Nin ligas komuna lingvo, komuna idealo, kaj komuna laborkapablo. Jen la fortoj, kiuj transportos nin al novaj sukcesoj en la venonta jarcento."

Multaj eminentuloj salutis kaj bondeziris al la kongreso kaj al Esperanto en la dua jarcento. Ankaŭ nia Ingemund Bengtsson sendis gratulleteron, en kiu li bedaŭris, ke li ne povas ĉeesti.

Karin Lindquist

Ĝi konsistas el 15-paĝa dokumento, kiu traktas la plej multajn flankojn de la strategia Esperanto-laboro. Ĝi volas doni la bazajn gvidliniojn por la estonteco, sed tute ne estas iu rigida, neŝangebla plano. Male, oni volas, ke la diversaj landaj asocioj bone studu ĝin kaj donu siajn opiniojn pri ĝi al la estraro.

Oni provis analizi la financon kaj personaran situacion de UEA kaj faris la laborplanon laŭ tio.

En la fino de tiu ĉi raporto mi menciis, ke la komitatanoj estis invititaj al la Centra Oficejo por vidi la rekonstruitan domon. Tiuj, kiuj antaŭe vidis la malnovajn ejojn, facile povas konstati la diferencon kaj la nun pli bonajn laboreblecojn de la oficistoj.

La komitatanoj estis invititaj ankaŭ al la urbestro, kiu honore al ili paroladis legante la vortojn en Esperanto.

Jen tre konciza raporto de la komitatkunsidoj. Dank' al la sperta gvidado de Humphrey Tonkin, ni fintraktis la tutan tagordon en ĝusta tempo. Pro tio li ankaŭ ricevis publikan dankon kaj laŭdon de Gregoire Maertens je la fino de la lasta kunsido.

Märtha Andréasson

## Internacia Koresponda Servo

helpos al vi trovi korespondanton/-inon, amikon/-inon aŭ partneron/-inon. Por pliaj informoj, sendu unu internacian respondokuponon al: Box 163 Stn "A", DOWNSVIEW, Ont. M3M 3A3, Kanado.



# "Scienco kaj tekniko por internacia kompreniĝo"

Kongresa temo en Rotterdam estis "Scienco kaj tekniko por internacia kompreniĝo". D-ro Ottó Haszpra, estrarano de UEA, enkondukis ĝin en la kongresa inaŭguro. Diskutgrupo kunsidis tri fojojn dum la semajno, kaj dum la dua ĝenerala kunsido de UEA en la vendredo oni pridiskutis proponon de rezolucio pri la sama temo, kaj la rezolucio oni akceptis en la sabato.

D-ro Ottó Haszpra estas estrarano de UEA pri faka agado. Li estas hungaro, profesoro pri hidratiliko. Li rigardis al la kongresa temo per okuloj de sciencisto:



D-ro Ottó Haszpra

- La tekniko povas kaŭzi danĝeron al la naturo de la terĝlobo. Ĉu ni do povus forigi tiujn danĝerojn se ni haltigus la sciencan? La afero ne estas tiel simpla. Forigo de tekniko kaŭzus malsaton. Plia scienca evoluo estas necesa por travivigi la biosferon, kaj tiel ankaŭ la homaron mem.


Homa kompreniĝo inter sciencistoj kaj aliaj homoj necesas, laŭ d-ro Haszpra, same kiel kompreniĝo inter fakoj. Nuntempe amaso da

homoj estas observemaj pri la efikoj de la tekniko, kaj tio siavice influas al la sciencistoj kaj teknikistoj. Iujn efikojn oni devas akcepti, sed kelkaj efikoj ne estas akcepteblaj. Ĝuste pri tio necesas pli da kontaktoj kaj pli da kompreniĝo.

En Esperanto aperas malmultaj sed altkvalitaj libroj pri scienco, same kiel periodaĵoj kaj konferencoj. Grava punkto estas, laŭ d-ro Haszpra, ke necesas aĉetantoj kaj partoprenantoj, se tiu agado havu estontecon.

## Scienco sen homeco

En la enkonduko al la diskutkunsido, D-ro Probal Daŝgupto aliris la kongresan temon el la kontraŭa direkto. Dialogo necesas por la scienco mem, kiam temas pri sociaj sciencoj. Tiu dialogo devas esti neŭtrala kaj egaleca. Por la eston-



D-ro Probal Daŝgupto

teco ni bezonos specialan sciencan pri interhomaj rilatoj, li diris.

D-ro Daŝgupto estas docento pri lingvistiko en Hindio (aŭ, per lia esprimo, Bharato). Lia tasko en la diskutkunsidoj estis kunordigi la diskutadon kaj trovi pliajn kunor-

digantojn se la grupo estus tiel granda, ke necesus dividi ĝin. En la serio de tri kunsidoj partoprenis ĉiufoje 20-40 personoj, el kiuj multaj alvenis nur post la komenco, kaj tial la grupo restis kune.

- La 19-a jarcento estis "homa" jarcento, diris d-ro Daŝgupto. Nia jarcento, la 20-a, estas la scienca jarcento. La venonta jarcento tre verŝajne estos la teknika jarcento. En la pasinta jarcento oni forpelis dion, en tiu ĉi jarcento oni forpelis la homon. Legu la romanojn de Szatmari, kaj vi komprenos, kion signifas scienco sen homeco.



D-ro Hans Michael Maitzen

D-ro Hans Michael Maitzen, astronomo el Aŭstrio, substrekis, ke ni memoru, ke la scienco kaj tekniko havas efikojn je monda skalo. En unu parto de la mondo oni manĝas tro da viando, kaj pro tio bredas multajn bovojn. Por tiuj necesas aĉeti multe da furago, kaj tion oni aĉetas je la internacia merkato. Alia lando ŝanĝas sian produktadon por povi vendi pli, ĝia produktado fariĝas pli kaj pli grandskala, kaj la arbaroj detruigas ĉie.



(daŭrigo de la antaŭa paĝo)

### Respondeco necesas

Je tiu ĉi punkto la diskutrondo ŝajnis relative unuanima pri tio, kion esprimis unu el la partoprenantoj: Necesas pli da sento de respondeco, kaj edukado al respondeco!

En la diskuto oni tuŝis ankaŭ ekz. problemojn de ozono, la riskojn de katastrofoj je produktado de nuklea energio, ktp.

Sed la kongresa temo povas havi ankaŭ alian dimension: Ĉu la scienco kaj tekniko povas helpi al ni interkomuniki?

La lasta diskutkunsido temis pri komunikado, kaj pri la rolo de Esperanto en tio. Fine oni revenis al la diskuto pri scienca eldonado en Esperanto.

- Ni esperantistoj kolektu ĉiujn niajn ekonomiajn fortojn por eldonadi sciencajn verkojn en Esperanto, diris s-ro Géza Felső el Hungario, kiu ankaŭ verkis artikolon en la revuo "Esperanto" pri la sama demando.

Al tio D-ro Daŝgupto atentigis, ke necesas bone pripensi kiaspecajn sciencajn verkojn ni eldonu. Tiu, kiu studas mallarĝan branĉon de iu scienco, bezonas aron da libroj jam nur pri tiu mallarĝa branĉo. Por legantoj de Esperanto kaj por tiuj, kiuj eventuale lernus Esperanton por povi legi sciencaĵojn per ĝi, unuavice necesas iom pli popularsciencaj libroj.

### Konkretaj taskoj

La kongresa rezolucio, kiu estis verkita kun la diskutoj pri la kongresa temo kiel elirpunkto, tre klare portis la animon de d-ro Haszpra. Ĝi konkludas, ke la esperantistaro devas apogi la sciencojn kaj ke ĝi devas aktive partopreni diskutojn pri la sekvoj de la moderna tekniko.


La rezolucio ankaŭ refirmigis pli malnovan rezolucion, kiun la kongreso en Pekino faris antaŭ du jaroj. En ĝi oni admonas al UEA, ke ĝi evoluigu la sciencajn eldonadojn de libroj, kun pluraj konkretaj taskoj.

Ulla Luin

## Fonduso memore al Gunnar Mattsson

Memore al sia forpasinta membro Gunnar Mattsson, Skövde Esperantoklubb decidis starigi fonduson por junaj membroj en Svedio. La klubo memdonis komencan kapitalon kaj nun alvokas aliajn donaci al ĝia poŝtgira konto 14 19 44 - 9.

## 73-a Universala Kongreso Centro Zamenhof prezentita



Dum la kongreso oni prezentis la unuajn planojn por la Centro Zamenhof en Bjalistoko.

En Varsovio oni anoncis pri tiu komuna projekto de la polaj instancoj kaj de UEA. De tiam okazis

rapida progreso, kiel oni povis vidi kaj aŭdi dum la kongreso

La plano estas konstrui grandan kulturen centron je la nomo de L.L. Zamenhof. Ĝi rolas kiel regiona kultura centro, kun teatraj kaj konferencaj instalaĵoj, kaj samtempe ĝi fariĝos internacia centro por la esperantistaro, kun muzeo, biblioteko, telekomunikaj rimedoj, hotelo, restoracio, kursejoj kaj prelegejoj.

### Sur iama vendoplaco

La Centro situos tute proksime al la urbocentro, tie, kie iam troviĝis la malnova vendoplaco, kie, laŭ la legendo, la juna Zamenhof praktikis siajn lingvajn kapablojn interpretante inter la diverslingvaj grupoj.

Reprezentantoj de la lokaj instancoj en Bjalistoko partoprenis la UK-on, kaj prezentis provizoran skizon de la Centro, kiun ni povas vidi ĉi-apude.

Karin Lindquist



# 73-a Universala Kongreso Svedoj sukcesaj en la belartaj konkursoj

Ni svedoj, kiuj ĉeestis, kiam d-ro Vilmos Benczik dum la roterdama UK prezentis la ĉi-jarajn rezultojn de la Belartaj Konkursoj, sentis grandan gojon kaj fieron. Ne malpli ol kvar premioj iris al svedoj!

Sten Johansson, filo al Signhild kaj Tore Johansson en Kalmar, gajnis la unuan kaj honoran premiojn de prozo. La verkoj nomiĝas "La ĉokolada biskvito", respektive "Renkontigo kun boaco".

Kerstin Rohdin gajnis la infanlibran premion, pro la libro "La fratoj Leonkoro" de Astrid Lindgren, kiun Kerstin tradukis al Esperanto. D-ro Benczik diris, ke li kutime ne tute tralegas la premiitajn librojn, sed tiun ĉi libron li ne povis forlasi antaŭ finlego.

Bertil Danielsson gajnis la duan premion por bildo de eta, dolĉa knabino, fotita dum la UK en Stokholmo 1980. Ni vidas la foton ĉi-apude.

Ni kore gratulas al niaj bravaj svedoj!

Karin Lindquist



## Recenzo Somera tago kaj aŭtuna vespero

### Fotopoŝtkartoj kun Esperanto-teksto

Similaj al tiuj vendataj dum la jarkongreso. Restas limigita kvanto, flor- kaj bestmotivoj. Prezoj kun sendokostoj:

8 malsamaj = 25 kronoj

20 poŝtkartoj (10 diversaj motivoj) = 50 kronoj

### Videofilmo VHS

Esperantlingvaj teatraĵoj kaj kantoj de la jarkongreso en Sundsvall, ankaŭ ekskursoj, ktp.

Kosto: 120 kronoj + sendokostoj 10 kronoj = 130 kronoj.

Jarkongresa programo 1988 + Jarkongreso en Sundsvall 1968 + Malnovaj SEJU-aranĝoj = 150 kronoj

(Lupago por unu semajno = 50 kronoj)

Mendu kaj pagu al: Ingrid Näsholm, Linderbergsgatan 4, 852 47 SUNDSVALL, poŝtgira konto 4346595-4.

de Inger Brattström (traduko de Malte Markheden), eldonita de Progreso Eldonejo, Motala. Prezo 40 kronoj + sendokostoj.

Inger Brattström estas bone konata kaj ŝatata verkisto de junularaj libroj. Tiu ĉi libreto temas pri amindaj dekkelkjaruloj, kiuj nur en la someroj renkontiĝas en vilaĝo ĉe la maro. Nun en la lasta tago ili jam enuas kaj sopiras al la urbo, kiam subite okazas io terura. Mara akcidento faras ilin pli proksima, unu al la alia. Ili neniam kutimis renkontiĝi krom en la someroj, sed en iu aŭtuna vespero ili decidis tion fari. Tiun vesperon ili ĉiu aparte travivas multajn aventurojn, ĝis ili fine renkontiĝas.

(daŭrigo sur paĝo 11)



# Tra la lando

## Renkontiĝo por geedzaj esperantistoj

Kvar geedzaj paroj esperantistaj el ses diversaj nacioj kolektiĝis en Skövde, kaj tiu okazintaĵo donis ideon pri venontjara, pli granda renkontiĝo por tiaj paroj.

La kvar paroj, kiuj kunvenis en Skövde, estis Hilgon kaj Kurt Frisk el Nederlando-Svedio, Ruth kaj Isidro Berniol el FRG-Hispanio, Lore kaj Henry Rydberg el GDR-Svedio kaj Charlotte kaj Börje Andersson el Hungario-Svedio. Kelkajn tagojn poste Andreo Petryn el Radio Varsovio dum vizito en Skövde kaptis la okazon intervjui tri el la paroj.

La paroj en Skövde nun alvokas "kolegojn" en Svedio kaj aliaj landoj al pli granda "kongreso" venontsomere, ekz. en aŭgusto.

Skribu al: Börje Andersson, Ingegatan 4 A, S-541 50 Skövde.

## Somera kurso en Karlskoga Popolaltlernejo

Laŭ la afabla invito de Lars Forsman, instruisto de lingvoj ĉe Karlskoga Popolaltlernejo, mi ektroviĝis tie kiel gvidantino de grupo por progresintaj esperantistoj.

Iam mi faris tie prelegon, kaj post tio restis memoro pri aparte bela situo de tiu eduk-centro. Tio allogis, sed tio alia estis necerta, precipe tio, kiaj esperantistoj aliĝos al tiu mia grupo, kiaj estos diferencoj en lingva prepariĝo kaj kia la gamo de intereso.

Unue mi pensis, ke sufiĉas, se mi pliprofundigos mian kapablon instrui laŭ rekta metodo, kaj se temos pri problemaro de la kurso, tio decidiĝos poste, surloke, en

rekta kontakto kun la grupo. Poste mi tamen venis al konvinko, ke estas pli bone proponi difinitan programon por la tuta semajno, kaj ĝian realigon dependigi de la lingva nivelo kaj ĝenerala prepariĝo de la kursanoj.

Tentis min programo, kiu ligus esperantan problemaron (esperantismon) kun bezonoj de la nuntempo. Aliflanke, ĉar en Karlskoga troviĝas muzeo de Alfred Nobel, kiu tie loĝis kaj havis sian laboratorion, kaj ĉar tie oni malfermis lian testamenton laŭ kiu ekestis la Nobelpremio, kiun oni atribuas al homoj, kies scienca aŭ propaca laboro akcelas progreson en la mondo, do celo kongrua kun Esperanto, mi decidis ligi ambaŭ aferojn en la temon: "Premioj de paca kunvivado".

Mi prilaboris detalan programon, enhavantan kaj diskuttemojn kaj informmaterialojn al kelkaj eroj de la programo. Ĝi enhavis ankaŭ proponojn rilate pritraktadon, realigadon. Disdonante al la kursanoj kopiitan programon, mi tute ne estis certa pri tio, kiel ili akceptos mian proponon. Ja, ili venis plibonigi sian lingvoscion, sed ankaŭ ripozi, ĝui la naturon, bani sin en la bela lago Möckeln.

La etoso, dum mi priparolis la programon, estis serioza. Ŝajnas al mi, ke eĉ tiuj samideanoj, kiuj ne estis ĝisfunde konvinkitaj pri la realigeblo (temis ĉefe pri kursanoj malpli bone preparitaj lingve), tamen bonkore volis doni al "serioza" gvidantino la ŝancon provi. Tial la programo estis akceptita sen ŝanĝoj.

Komenciĝis dopor ni ĉiuj interesa "aventuro". Montriĝis, ke ni povas analizi kaj diskuti sociajn problemojn, inkluzive sociopolitikajn konvinkojn de Zamenhof, prezenti diversajn vidpunktojn pri la temoj, alproprigi novajn vortojn kaj nociojn, kaj ĉion ĉi fari en amika, senstreĉa etoso, en konvinko, ke oni bone utiligas la tem-

pon. Aparte ĝojige estas, ke kelkaj, kiuj nur hezite restis en la grupo, poste estis kontentaj pri sia decido.

La gvidantino havis feliĉon havi en sia grupo du spertajn kaj movade meritajn samideanojn, Gun Gerdman kaj Erik Bohlin. Ilia amika kaj simpatiplena kompreno al la strebado de la gvidantino multe helpis. Cetere la tuta grupo montriĝis studema kaj amika.

Bela ĉirkaŭaĵo, agrabla personaro, la ĉionzorganta, favora kaj malferma por bonaj ideoj organizanto de la Esperanto-instruado en Karlskoga, Lars Forsman...

Cio ĉi katas, ke ĉi tie oni povas kaj bonege ripozi kaj en agrabla maniero riĉigi sian lingvonon kaj ekhavi pensigajn ideojn pri si mem kaj la mondo ĉirkaŭ ni.

La kurso ankoraŭ ne finiĝis – restas unu tago – kaj la popola proverbo diras: "Ne laŭdu tagon antaŭ sunsubiro". Mi tamen estas konvinkita, ke tiuj, kiuj decidis veni al Karlskoga Popolaltlernejo por partopreni la 8-semajnajn Esperantokursojn, kiujn gvidas Lars, kaj por partopreni la somerajn unusemajnajn kursojn, kiujn krom li gvidas invititaj gastoj, ne bedaŭros tion...

Zofia Banet Fomalowa

## Kio okazos en Malmö inter la 22-a kaj 23-a de oktobro?

Tre interesa seminario aranĝita de la Suda Distrikto!

S-ro Odd Tangerud el Norvegio gvidos seminarion pri norvega literaturo. La partoprenontoj ricevos tekstojn por prepari sin antaŭ la seminario. Parto de dramo de Ibsen estos prezentita kiel unupersona teatraĵeto.

Tiuj, kiuj jam konas s-ro Odd Tangerud, certe povas imagi al si, ke tiu semajnfino estos valora!

Pliajn detalojn pri programo kaj kostoj vi povas ricevi de: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl 455, 242 94 HÖRBY, tel. 0415/501 52.



# Oomoto invitis

## Sukcesa seminario pri tradiciaj japanaj artoj

Vere interesa, instrua, memorinda, gojplena, amikeca sed iom laciga – jen la impresoj de la unua seminario por esperantistoj pri tradiciaj japanaj artoj, kiun aranĝis dum 14 tagoj en majo ĉi-jare la Oomoto-lernejo en Kameoka, Japanio. Partoprenis ĝin kvin personoj el kvin diversaj lando: Brazilo, Hungario, Nederlando, Svedio kaj Svislando.

Dum la seminariaj lecionoj ni portis japanajn vestojn – kimonojn, hakamonojn, budo-vestojn, ktp. Tiujn vestojn oni fiksas per rubandoj kaj nodoj, kiuj diferencas depende de kiu arto estu praktikata. Ni ofte ŝanĝis vestojn, tial ni ankaŭ lernis la arton fari nodojn, kaj krome kiel uzi ventumilon.

### Bonhumoraj instruistoj

Por instrui al ni ĉi tiujn artojn, gearo da instruistoj kaj kunlaborantoj de la Oomoto-Centro estis okupataj, ĉiam afablaj, amikaj kaj bonhumoraj. La ĉefgustinstruistoj estis veraj ekspertoj. De ili elradiis trankvileco, kiu donis al ili specialan belecon kaj helpis al ni ne perdi la kuraĝon, kiam ni kelkfoje sentis nin nekapablaj aŭ iom lacaj.

Ankaŭ post la vespermanĝo estis diversaj programeroj: prelegoj, rakontado al lumbildoj, renkontiĝo kun lokaj esperantistoj, intervjuoj por gazetoj, ktp. Kaj plej laste en la vesperoj ni ĉiuj – gastoj kaj gastigantoj – kolektiĝis en la ĉambro de iu seminariano, drinkis glaŝon da sakeo kaj amike babilis.

### Ekskursaj kaj liberaj tagoj

En la programo estis ankaŭ dutaga ekskurso, unue al Oomoto-Centro en Ajabe, kie ni tranoktis. Tie ni i.a. admiris la grandan preĝejon, konstruitan laŭ malnova maniero tute sen najloj. Ni ankaŭ vespermanĝis

en bela antikva japana domo, guante la mirindan ĉirkaŭan naturon, aŭskultante la plaŭdeton de eta akvofalo. Vespere ni estis invititaj al teceremonio en la tedomo de la Centro. Tiam la tuta ĝardeno ekstere estis iluminita per amaso da kandelaj lanternoj, dum oni estingis la elektran lumon de la tuta Centro. Tio donis preskaŭ fabelan impreson al la ĝardeno kaj neforgeseblan memoron al ni.

La postan tagon ni datrigis la ekskurson al tre bela loko ĉe la Japana Maro. Dum la libera tago ni unue partoprenis la enkondukan ceremonion por la rizoplantado. Poste kelkaj el ni veturis al Kyoto kaj i.a. vizitis la faman muskoĝardenon tie.

### La malferma kaj ferma ceremonioj

Multaj personoj sekvis la inaŭguron kaj la fermon de la seminario en la bela preĝejo de la Oomoto-

Centro. Tiam parolis i.a. la direktoro de Oomoto, s-ro Kyotaro Deguĉi. La lastan tagon la seminarianoj montris al la ĉeestanta publiko, kion oni lernis, kaj vespere ni havis aditaŭn kaj dankan feston. Fariĝis tre gaja vespero kun same amikaj kaj kora etoso, kiel regis dum la tuta seminario.

Jen mallonga kaj tute ne kompleta raporto pri vizito en Japanio kaj renkonto kun ilia kulturo. La Esperanto-Propaganda Asocio de Kameoka intencas ripeti la kursojn por esperantistoj en venontaj jaroj. Mi vere subtenas tion kaj deziras al ili bonan sukceson. Mi ankaŭ admonas al esperantistoj aliĝi al la kurso kaj konatiĝi kun la japana kulturo kaj japana afableco. Samtempe vi helpas al la grupo montri al la japana publiko la valoron de nia lingvo por prezenti kaj konatiĝi ilian kulturon al la cetera mondo.

Märtha Andreasson

### Donacoj

|                                                                        |        |
|------------------------------------------------------------------------|--------|
| Linköpings Esperantoklubb<br>Bidrag för information)                   | 100:-  |
| Regina Emson, Borås                                                    | 50:-   |
| Claes-Göran Ingestedt, Vällingby                                       | 100:-  |
| Claes-Göran Ingestedt Vällingby                                        | 100:-  |
| Stina & Fred Turner, Ljungsbro                                         | 500:-  |
| Gunilla Björkman, Skövde<br>(Memore de Gunnar Mattsson)                | 100:-  |
| Berit & Barbro Guthe-Linder, Gävle<br>(Memore de Elma Adamsson)        | 100:-  |
| Claes-Göran Ingestedt, Vällingby<br>(Denove, donacas regule ĉiumonate) | 100:-  |
| Claes-Göran Ingestedt, Vällingby<br>(Denove)                           | 100:-  |
| Ulla Luin, Tyresö                                                      | 742:-  |
| Vilhelmina Esperantoklubb                                              | 150:-  |
| "Anonimulo"                                                            | 2000:- |



# Vizito ĉe "ĝemeloj" Mankegas E-instruistoj en Tanzanio

Ni ĵus festis la svedan somermezon, kiam fine de junio Jan Setréus kaj mi vojaĝis al Tanzanio por tie renkonti esperantistojn. Nia celo estis gvidi kurson, se eblas aranĝi tion en la urbo Tabora. Tiu urbo estas centro de samnoma regiono kaj en tiu regiono troviĝas kvin kluboj aŭ grupoj. La klubanoj estas ĉefe rifuĝintoj el diversaj afrikaj landoj kaj antaŭ du jaroj nur unuopuloj konis Esperanton.

Estis dimanĉo, kiam ni atingis Dar-es-Salaam (DSM). Ni sciis, ke troviĝas kelkaj esperantistoj tie, sed miris, kiam ĉe la pordo aperis delegacio de sep personoj. Du estis senditaj al DSM de la kluboj en Tabora.

Ek de tiu tago ni havis kurseton kun unu ĝis ok partoprenantoj, kaj provis kurslibron en la svahila ellaboritan de Jan. La progresintoj studis kaj komentis la kurslibron.

Cetere ni uzis la tagojn por viziti la ministerion pri enlandaj aferoj por certigi, ke ni povu renkonti la rifuĝintojn, kaj aliajn homojn por ĝenerale akiri informojn pri kontakteblecoj por aranĝi instruadon. Kaj por akiri biletojn al Tabora, tasko ne facila.

Jaŭde vespere Jan foriris, klopodante atingi Tabora-n per aŭtobuso kaj... Mi restis en DSM kaj sukcesis aviadile atingi Tabora-n sabate.

Dimanĉe ni renkontis niajn amikojn plurfoje en diversaj grupetoj. Ili vere soifis lingvan gvidadon kaj informojn pri la movado. Tiom da demandoj trafugis la aeron, kaj ni rezignis klopodon respondi al ĉiuj. Ni ankaŭ kune diskutis kiel aranĝi kvar-ĝis-sestajajn kursojn. Jes, nun plurajn, ĉar aliĝis komentantoj kaj Jan volis kapti la okazon provi sian materialon. Kondiĉo tamen estis, ke la lokaj aŭtoritatoj permesos la aranĝon. En DSM ni

havis permeson, ke ĉiuj klubanoj de la diversaj rifuĝejoj kampoj havos permeson viziti la urbon por kurso, kondiĉe ke la regionaj kaj lokaj aŭtoritatoj konsentos.

Lundematen ni vizitis la regionan oficejon, kie oni klarigis, ke nur en DSM, ĉe la ministerio, oni povas permesi al ni aktivi, kaj ke cetere ĉiu instruisto en la lando devas esti dungita de la ministerio de edukado. Tiu estis la unua renkontiĝo kun la loka administracio.

Ni renkontis ankaŭ aliajn personojn antaŭ nia urĝa foriro la sekvan tagon. Foriro konsilita por trankviligi la situacion, ĉar kvar el niaj amikoj nun trovis sin ĉe la polico. La kialo estis por ni nekomprenebla, kaj nur fine de aŭgusto mi ricevis leteron, kiu klarigis, ke la kvaropo dum sia kvintaga mallibero estis multfoje pridemandita pri tiu nekonata, stranga lingvo uzita.

Jan kaj mi dimanĉe disiĝis en Arusha, kien ni veturis pasante tra Mwanza kaj Bunda per aviadilo, aŭtobuso kaj petveturante per plej diversaj aŭtoj. Ni klopodis, sed ankoraŭ ne sukcesis kontakti Tabora-n kaj la ceteran mondon telefone. Dum la vojaĝo mi disdonis 12 kilogramojn da libroj al klubanoj,

---

(daŭrigo de paĝo 9)

En tiu ĉi eta libro ĉiam okazas io streĉa, ĝi estas plena de aventuroj. Multaj el ili estas sufiĉe oftaj en la vivo, tamen tre interesaj ĉefe por dekkelkjaruloj. Kaj, grave, ili estas instruaj. La ĉefroluloj estas simpatiaj. Per tre bona psikologio estas priskribitaj iliaj sentoj kaj reagoj al la okazintaĵoj.

Legante la libron mi sentis kvazaŭ mi mem estus partoprenanto. Estas ĝojo legi ĉi tiun turnoriĉan rakonton.

kaj faskon da informiloj al administraciaj funkciuloj.

Dum kaj post nia vizito fondiĝis almenaŭ unu nova klubo kaj la regiona Tabora Esperanto-Federacio. La kluboj pli fervore laboras por la oficialigo de Esperanto, kaj pluraj kuragiĝaj leteroj alvenis. En novembro pola esperantisto veturos al Tanzanio por resti tie dum pluraj monatoj instruante. Ni esperu, ke la klopodoj de la kluboj kaj de UEA certigos al li la eblecon labori en kampo, kie mankegas instruantoj.

Al niaj afrikaj samideanoj mankas la eblecoj vojaĝi tiel libere kiel ni. Iliaj kontaktoj kun aliaj esperantistoj okazas ĉefe per korespondado. Ĉu vi havas afrikan leteramikon? Se vi ankoraŭ ne havas, kontaktu min kaj mi donos al vi adresojn en Tanzanio.

Ĉu ne ankaŭ via klubo havu "ĝemelon"™ en Tanzanio? Mi volonte kunhelpos.

Ĉu vi ŝatus viziti niajn tanzaniajn amikojn? Nu, kiel ordinara turistino. Vi renkontus entuziasmajn homojn en lando, kie la turismo ankoraŭ ne metis internacian stampon ĉie.

Anita Lindblom

## Parto de la sankta Biblio

Represita el la paĝoj de la Nova Testamento – "Sankta Johano", 40 paĝoj, 12,4x7,5cm, pezo 14 gramoj. Prezo 2.50 kronoj + afranko. Utilega por prezenti al amikoj!

Aĉetebla ĉe: Esperantomisio, Box 2007, S-69402 HALLSBERG2, Svedio. Poŝtgira konto 88451-0.



# Presenterat i Rotterdam

## Informationsmaterial för skolbruk

Under världskongressen i Rotterdam presenterades ett mycket intressant informationsmaterial för skolbruk som fått benämningen "Lerneja Projekto", vilket utarbetats av UEA. Här kan endast lämnas en mycket summarisk redogörelse för innehållet, som omfattar 17 A4-sidor i den svenska versionen.

Detta informationsmaterial består dels av ett lärarblad, dels ett elevblad som innehåller arbetsuppgifter. För genomgång av materialet beräknas 5-6 lektionstimmar, som lämpligen kan fördelas på olika lärare, så att så många lärare som möjligt ska få kännedom om dess innehåll. Varje avsnitt inleds med

en fråga:

*Del 1 - Vad vet du om språk? Känner du igen dem, när du hör dem?*

Varje elev får ett arbetsblad för att besvara en rad frågor. Ett kassetband med frasen "God morgon, hur står det till" inspelad på ett antal olika språk ger eleven möjlighet att försöka identifiera så många som möjligt.

*Del 2 - Vilka är de mest talade etniska språken, och var talas de?*

*Del 3 - Vilka språk måste man undervisa som främmande språk i världens skolor?*

*Del 4 - Språkmångfald och en kort översyn av världens språkproblem.*

Till detta avsnitt får eleverna lyssna på ett kassetband, "Språkproblemet i internationella sammanhang". (En tryckt utskrift ingår som hjälp för läraren.)

*Del 5 - Kostnaden för alternativa lösningar av språkproblemen i internationella organisationer.*

*Del 6 - Ett planerat internationellt språk.*

Informationsmaterialet "Lerneja projekto" kan rekvireras från:  
**Kerstin Rohdin,  
Ringvägen 11B,  
579 00 HÖGSBY,  
tel. 0491/20461.**

**Karl M. Blomkvist**

## Sur la librobretaro...

|                                                |      |                                               |      |
|------------------------------------------------|------|-----------------------------------------------|------|
| Esperanta songazeto n-ro 5 (kasedo)            | 102- | LAPENNA, Kritikaj studoj defende de Esperanto | 125- |
| Interlingvistiko-Esperantologio                | 73-  | LINZ, Kion travivis aŭstria familio...        | 128- |
| Naturo kaj socio                               | 96-  | MAUL, Vortaj (a)ludoj                         | 51-  |
| Oranĝa ombrelo                                 | 21-  | MOIRAND, Murdo en Esperantujo                 | 99-  |
| Suplemento al PIV                              | 53-  | NIKOLIN, Invito al ĝojo (kasedo)              | 102- |
| (AKADEMIANOJ), 100-jara Esperanto              | 161- | PAULI, Mil jaroj de kristana filozofio        | 175- |
| (AULD & MAUL), Sub la signo de socia muzo      | 158- | PIORO, Fundamento de kemia nomenklatur        | 160- |
| ARNAUDOV, Amuza matematiko por gelemantoj      | 47-  | PIRON, Psikologiaj reagoj al Esperanto        | 15-  |
| AULD, En barko senpilota                       | 385- | SILFER, Desislava ridetas                     | 127- |
| AULD, La fenomeno Esperanto                    | 80-  | SULCO, La trombonoj de Jeriko                 | 68-  |
| CASTRO, La historio absolvos min               | 27-  | SULCO, Vespero jam fariĝis                    | 89-  |
| COFINO, La lasta virino...                     | 40-  | URBANOVA, Verso kaj larmo                     | 86-  |
| (CORSETTI), Knedu min, sinjorino!              | 43-  | WARINGHIEN, Beletro, sed ne el katedro        | 161- |
| DORVAL, Kazinski venas tro malfrue             | 110- | WELLS, Jen nia mondo 2                        | 54-  |
| (DUC GONINAZ), Studoj pri la internacia lingvo | 157- | Jen nia mondo 2 (kasedo)                      | 70-  |
| ELGO, Sia lasta poŝtkarto                      | 158- |                                               |      |
| GALL, Obsedita de l' suno                      | 81-  | ELDONA SOCIETO ESPERANTO                      |      |
| GIBRAN, La Profeto                             | 40-  | Box 1502, 200 42 Malmö                        |      |
| GISHRON, Lingvo kaj religio                    | 171- | Postgiro 578 - 5                              |      |



## Internacia universitato en Ĉinio uzos Esperanton

Academia Sinica, la Ĉina Akademio de Sciencoj, planas krei internacian universitaton pri scienco kaj tekniko en Pekino.

La universitato havos Esperanton kiel ununuran labor- kaj studlingvon, kaj ĝia nomo estos "Internacia Esperanta Scienc-Teknika Universitato (IESTU).

La intenco nun estas serĉi kunlaboron kun eksterlandaj universitatoj kaj akademioj. Tiuj ĉi povos poste sendi instruistojn kaj studentojn al la universitato. Oni nun atendas reagojn de eksterlando.

Intereso montrita flanke de la sveda registaro, edukaj aŭtoritatoj, altlernejoj, universitatoj kaj akademioj tial povos esti signifaj por la venonta evoluo. La Ĉina Akademio de Sciencoj volonte akceptos, ke sveda universitato fariĝos unu el la fondantoj de la planita universitato. Svedio, kiel neŭtrala lando, havas bonan reputacion en Ĉinio.

Christer Kiselman, profesoro pri matematiko en la universitato de Uppsala kaj fervora esperantisto, rakontas, ke li dum vizito al Ĉinio renkontis multajn studentojn, kiuj post okmonata studo parolis bonegan Esperanton, ĉar Esperanto estas studata en multaj universitatoj kaj altlernejoj. Ilia scipovo akre kontrastas kun la grandaj malfaciloj, kiujn havas studentoj studintaj la anglan dum ses jaroj. Ilia tre rudimentan anglan prof. Kiselman preskaŭ ne povis kompreni, kaj ili ankaŭ ne povis kompreni lin.

Estas grave, substrekas prof. Kiselman, ke intereso ekzistanta estos formulita kaj ke tiaj opiniesprimoj alvenos al: Academia

Sinica, Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio, 52 Sanlihe, 100864 Beijing, Ĉinio.

## Luksa Esperanto-broŝuro pri Norvegio

Norvegio nun denove havas belan broŝuron en Esperanto, kiun ĉiu alia lando povas envii.

La norvega ministerio pri eksteraj aferoj eldonis novan, reviziitan version de la broŝuro "Norvegujo". Ĝi havas 16 paĝojn da teksto kaj 8 paĝojn kun koloraj bildoj, ĉiuj en granda formato. La tuto donas luksan impreson.

Titoloj de la artikoloj: Lando kaj popolo, trafikado, homoj kaj medio, historio, reĝimo kaj ekstera politiko, ekonomio, fiŝado, agrikulturo, kulturo, publika sano kaj socialaj bonoj, edukado kaj reserĉado.

La broŝuro estas senpage havebla de: Norvega Esperantista Ligo, Olaf Schous vei 18, N-0572 Oslo 5, Norvegio.

## Invito al Zairio

Venis letero el Lukala, Zairio. Inter alie oni petis min publikigi mesaĝon de la Esperanto-Instituto de Zairio:

"... La 31-an de majo 1989 la Esperanto-Instituto de Zairio celebras sian 25-an datrevenon en la disvastigo de la Internacia Lingvo Esperanto. De 1964 ĝis nun estis por EIZ jaroj de konstanta kaj ĉiama batalado por disvastigo de Esperanto kaj kunlaboro en la persista progreso de la Esperantomovado

en Zairio kaj en Afriko generale. Tiukaze ni invitas samideanojn en la tuta mondo celebri kune kun ni en 1989 la 25-jariĝon de EIZ, la plej amasa kaj plej organizita landa Esperanto-asocio en Afriko. En 1989 EIZ okazigos gravajn manifestaciojn: Ekspozicioj, kulturaj vesperoj, porinfanaj konkursoj. Ĉia helpo estas bonvena.

Memorinde estas, ke inter 1984 kaj 1987 pli ol 700 personoj estis esperantigitaj kaj fakte aligis al EIZ/UEA. Hodiati ni povas fieri pri amasa nombro de membroj, kiu atingos ĝis la fino de 1988 la ciferon 1000. Konklude, gesamideanoj el evoluantaj landoj okcidente kaj oriente estas petataj fari ĉion eblan por subteni nian Esperantomovadon per ĉia helpo. Pozitiva subteno ege urgas!

Koran dankon, via Ngangu Nduantoni-Bakidila, prezidanto de Esperanto-Instituto de Zairio."

Jen la mesaĝo. Tiuj personoj atkluboj, kiuj volas subteni la agadon de EIZ, povos kontakti la Instituton laŭ adreso: B.P. 13, Lukala, Bas-Zaire. Ĉia speco de helpo valoras - mono, lernolibroj uzitaj kaj neuzitaj, preferu en franca lingvo. Oni uzas nun i.a. "Junulkurson". Ankaŭ ĉemizoj kun Esperanto-teksto estos bonvenaj.

Märtha Andreasson

## DONACOJ

### Klubo Cent

|                      |       |
|----------------------|-------|
| Herbert Lindros,     |       |
| Hjälmaryd            | 100:- |
| Harald Andersson,    |       |
| Grythyttan           | 100:- |
| Olle Olsson, Lund    | 100:- |
| Charlotte Andersson, |       |
| Skövde               | 100:- |
| Börje Andersson,     |       |
| Skövde               | 100:- |

### Klubo Mil (Por lukostoj)

|                             |         |
|-----------------------------|---------|
| Norrköpings Esperanto-klubb | 1 000:- |
|-----------------------------|---------|



# Nekrologoj

## Sven Alexandersson

La 25-an de julio unu el niaj plej efikaj kaj entuziasmaj membroj – Sven Alexandersson – forlasis nin post longa malsano. Ni ĉiuj bedaŭras la forpason de nia energia, amika kaj simpatia "Salex", unu el la Honoraj Membroj de Sveda Esperanto-Federacio.

Li naskiĝis en Söderhamn la 19-an de marto en 1915, kaj en la sama urbo li en 1934 trapasis la studentan ekzamenon. Poste li studis ĉe la elektra fakulo de la Teknika Altlernejo (Tekniska Högskolan) en Stokholmo.

Kiel civila inĝeniero li estis en 1939 dungita ĉe la telefona kompanio LM. Ericsson en Stokholmo, por poste transiri al la Nomenklatura Centrejo (Nomenklaturcentralen) en Västerås. Sed pli poste li reiris al LM. Ericsson por resti tie ĝis sia emeritiĝo. En LM. Ericsson li estis sekciestro kaj membro de la Normiga Komitato (Standardiseringskommittén).

Li komencis studi Esperanton en 1934 kaj partoprenis nur unu solan kurson, nome la korespondan kurson de Eldona Societo Esperanto. Ĉe la Sveda Esperanto-Instituto li trapasis la superan ekzamenon de Esperanto.

Jam je siaj unuaj kontaktoj kun stokholmaj esperantistoj li en 1939 sukcesis fondi junularan grupon, kiu nomis sin "Migranta Rondo". Tiu grupo havigis al si multnombre vizitotan somerdomon, kaj laŭ lia ideo la grupo en 1940 partoprenis la festan marŝaranĝon en la stokholma stadiono en la Tago de la Sveda Flago. Poste li estis preta fariĝi prezidanto de Grupo Esperantista de Stokholmo.

Aliaj postenoj baldaŭ viciĝis kaj li fariĝis sekretario de Sveda Esperanto-Federacio, sed baldaŭ ŝanĝis tiun komision kaj fariĝis longedaŭra kaj treege ŝatata kasisto de tiu sama federacio. Montrante grandan dankon por lia efika laboro, la jarkunsido de SEF en Helsing-

borg 1985 elektis lin Honora Membro.

En la internacia Esperanto-movado li dediĉis sian intereson al ISAE (Internacia Scienca Asocio Esperantista), kie li fariĝis sekretario-kasisto kaj dumviva membro. Oni povas aldoni, ke li estis membro de la kongresa komitato por la Universala Kongreso en Stokholmo en 1980.

Tre grandan intereson li havis por la Esperanto-poezio, li tradukis plurajn svedajn popolkantojn (ekz. "Där björksarna susa", "Glad såsom fågeln" kaj kompreneble lia "Salexkanto": "Sov du lilla vide ung"), kaj eĉ eldonis kreskantan kantaroon kun pluraj propraj kaj aliaj tradukoj. Menciinda estas ankaŭ lia traduko en Esperanton de "Pippi Longstrump" de Astrid Lindgren, ankoraŭ ne eldonita.

La Esperanto-movado ŝuldas al Sven Alexandersson la plej grandan dankon pro liaj grandegaj laboroj kaj entuziasmo por nia lingvo, kaj kondolencas ĉe la filo Jan kaj la filino Kristina. Li ripozu en paco.

Jan Strönné

## Curt Alf

Unu el la plej aktivaj membroj de la Esperantoklubo en Norrköping, Curt Alf, post nelonga periodo de malsano mortis la 17-an de junio 1988. Jam en 1930 li ekstudis Esperanton en kurso de T. Morariu, kaj tuj aliĝis al la novfondita klubo, kies fidela membro li restis ĝis la morto. El liaj meritoj kiel esperantisto estas menciinde, ke li dum kvindek sinsekvaj jaroj funkciis kiel klubarevizoro, ĉiam apogante la agadon kaj evoluon de la klubo. Inter 1978 kaj 1987 li estis UEA-delegito. Plur-

foje li lerte funkciis kiel prezidanto en jarkunsidoj de SEF. Pro lia longedaŭra aktiva laboro por Esperanto, la klubo en la jarkunveno ĉi-jare decidis nomumi lin kaj lian edzinon Gun honoraj membroj. En 1934, kiam fondiĝis sveda sekcio de KELI, Curt Alf aliĝis kiel membro kaj restis fidela.

Lia profesia laboro kiel socierverto estro donis al li oftajn eblecojn al personaj kaj idealismaj kontaktoj kun homoj, junaj kaj maljunaj.

Humile ni honoras kaj dankas nian karan amikon kaj kunlaboranton.

Nils Johansson

## Viktor Janheim

Forpasis post mallonga malsano Viktor Janheim, Kungsör. Li estis FD pri abelbredado, lia granda intereso.

Jam antaŭ la dua mondmilito li vagadis en Estonio kaj Britio utiligante la internacian lingvon. Sekvis vojaĝoj en aliaj eŭropaj landoj post la milito kaj li i.a. partoprenis la unuan postmilitan kongreson en Bern.

Dum du jaroj li laboris kiel ĵurnalisto kaj i.a. verkadis artikolojn pri vojaĝoj en Malproksima Oriento. Precipe lin interesis Hindio, kiun landon li vizitis plurfoje kaj ankaŭ prelegis en la universitato Santiniketan. Li ankaŭ iniciatis monkollekton por hindaj esperantistoj, inter kiuj li havis multajn bonajn geamikojn. Ĉiuj ŝatis lian spritan humoron kaj grandan konon de humanecaj aferoj, kaj li ofte prelegis en Esperantokluboj. Li ankaŭ gvidis Esperantokursojn kaj ĉiam planis aktivecojn por disvastigi Esperanton. "Ni devas fosi nian sulkon" li ofte diris kaj ni plej bone honoras lian memoron sekvante lian devizon.

Jack Snarberg



STEN SVENONIUS

ERIKSTORPESGATAN 26 A

217 54 MALMÖ

## Ragnar kaj Sven

Du el niaj plej elstaraj kaj ŝatataj kunlaborantoj forlasis nin. Kun profunda funebro ni sentas ilian foreston.

Dum multaj jaroj ili laboris diverskampe por SEF kaj la estraro ŝuldas grandan dankon al ili.

Ni ankaŭ uzas okazon por danki ĉiujn, kiuj sammaniere honoras forpasintajn gesamideanojn. Ni sentas grandan respondecon uzi tiujn donacojn por Esperanto en plejeble rezultdona maniero.

**Karin Lindquist**  
prezidanto

### DONACOJ

**Donacoj memore al Ragnar Hjorth**

Anita Lindblom, Kista 200:-  
Eivor, Lennart & Fredrik Pettersson, Nyköping 25:-  
Mats Karlberg, Solna 30:-  
Hans-Göran Isaksson, Östersund 50:-  
Ulla Luin, Tyresö 50:-  
Svante Widing, Bromma 150:-  
Bertil Åkerberg, Hägersten 500:-  
Sonja, Lars-Anton & Ylva Svensson med familjer, Sollentuna 200:-  
Skogsvårdstyrelsen i Värmland 100:-  
Lisbeth Nilsson, Berga, med Eva, Ingvar, Siri, Folke, Gunnel & Arnold 200:-  
Clara, Elisabeth & Tage Appelqvist, Johanneshov 300:-  
Torbjörn Midunger, Umeå 50:-  
Fastighetsbolaget Grinden 22, Stockholm 300:-  
Betty & Ingemar Lindström, Jönköping 100:-  
Ingemar Linné, Nyköping 100:-  
Eva & Mats Hemming, Sandared 200:-  
Inger & Vera Fahleson, Bromma 500:-

Karl Göran Enander, Jönköping 50:-  
Bengt Pettersson, Bromma 100:-  
Agneta Briheim, Bromma 50:-  
Hjorth, Västerås 100:-  
Ingemar Nordin, Stockholm 100:-  
Birgitta & Björn Wahlström, Saltsjöbaden 200:-  
Karin Lindquist, Arboga 50:-

### Donacoj memore al Sven Alexandersson

Gunnar Agrell med familj, Vällingby 50:-  
("Med tack för varm vänskap")  
Ulla Luin, Tyresö 100:-  
("Memore al Salex")  
Birgit Nordlund, Säter 45:-  
("En vemodig sista hälsning")  
Anna-Greta & Jan Strönne, Malmö 200:-  
("Till Sven Alexanderssons minne")  
Gun Gerdman, Stockholm 100:-  
("Till Sven Alexanderssons minne")  
Gullan & Holger Eriksson, Johanneshov 50:-  
("Till minne av Sven Alexandersson")  
Margit & Bert Berg, Enskede 75:-

("Till Sven Alexanderssons minne, tack för vänskap")  
Ingeborg, Gösta, Lilly, Lennart, familjerna Lennartsson & Medin, Sorunda 100:-  
("Till minne av Sven Alexandersson, vår sista hälsning")  
Runo Stridell, Borensberg 100:-  
("Je memoro de bona amiko Sven Alexandersson")  
Lilian Berquist, Gunilla & Åke Dahlberg, Ingmari Bergquist & Mike Ferm, Umeå 200:-  
("Med anledning av Sven Alexanderssons begravningsakt")  
Alice & Nils Johansson, Norrköping 100:-  
("Till Kerstin och Sven Alexanderssons minne")  
Stockholms fredsförening 100:-  
("Till minnet av Sven Alexandersson")  
Karin Sehlstedt, Johanneshov 100:-  
("Salex... ĉion vi faris por Esperanto - Dankon!")  
Sally & Tore Sjöblom, Stockholm 100:-  
("Till minne av Sven Alexandersson")  
Ulf Ribers, Motala 100:-  
("Till minne av Sven Alexandersson")  
Inga & Rolf Leander, Hudiksvall 100:-  
("Till minne av Sven Alexandersson")  
Sune W. Ahlm, Vänersborg 100:-  
("Till Salex minne")  
Svenska Elektriska Kommissionen, Kista 300:-  
("Sven Salex Alexanderssons minne")  
Karin Lindquist, Arboga 50:-  
Ingemar & Margit, Stockholm 100:-  
("Till minne av Salex")  
Lilly Vikström, Maria Hansen, Stockholm 50:-  
("Je memoro de Salex")